

La Espero

2006:5



Kaptado de petromizoj en Finnlando

Kial La Espero raportas pri kaptado de petromizoj (*nejonöga, nättling*)? (Vidu la bildon maldekstre.)

Dum la aŭtunaj tagoj de finnaj esperantistoj en Haukipudas en norda Finnlando oni povis spekti tiun fiŝkaptadon, sed ankaŭ partopreni ekskurson al ŝtonepoka vilaĝo, aŭskulti prelegon pri aktualaj tendencoj en la Esperanto-movado, kanti kaj tute simple renkonti esperantistojn el nia orienta najbara lando.

Partoprenis ĉirkaŭ 50 esperantistoj, el kiuj du svedoj.


Fotis: Leif Nordenstorm

Informado, instruado kaj utiligado de Esperanto en seminario

Sveda Esperanto-Instituto invitis al du-taga seminario en Karlskoga Popola Altlernejo la 7-an ĝis la 8-a de Oktobro 2006 La Temo estis informado, instruado kaj utiligado de Esperanto.

Radojica Petroviĉ parolis pri aktualaj tendencoj en pedagogio, instru- kaj lerneteknologio kaj instrumentodiko de lingvoj kaj ni ĉiuj vige interparolis. Poste li parolis pri sukcesfaktoroj en Esperanto-instruado. Li speciale parolis pri la modernigo de la internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA, ĉar SEI-jarkunveno decidis aliĝi al ILEI/UEA internacia ekzameno.

Eble vi povos ion legi sur la bildo. Vi tamen tute certe povos pli multe legi pri la seminario sur paĝo 3.



LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Novembro 2006 • 94-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm

Frågor om prenumeration o. dyl.:
Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: esperanto@globalnet.net

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2006: 200 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlems-
avgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00

E-post: sef@esperanto.se
Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider
dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2006:
Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar un-
der 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Espe-
rantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*.
Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Masthuggsliden 1, 413 18 GÖTEBORG

Telefon: P.g.a. flytt ingen just nu. Vi återkommer.

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.algonet.se/~eldona/
E-post: eldona@telia.com

Telefon: 031 - 12 05 94. Telefonsvarare finns.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Anita Dagnarsdotter

Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11
961 76 Boden, tel. 0921-123 54
e-post: esperanto@globalnet.net

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

NI PREZENTAS

Siv Burell

Kie vi naskiĝis?

Mi naskiĝis en Kristianstad en 1939. Mia familio transloĝiĝis al Jonköping kiam mi estis 12-jara. Tiam mi devis forlasi mian skanian dialekton, kiu ne estis populara en Smolando.

Kie vi loĝas?

Mi loĝas en Gråbo, vilaĝo 5 km. for de la limlinio de Gotenburgo, sed 30 km de la centro.

Pri kio vi laboras?

Ek de januaro 2005 mi estas pensiulino. Antaŭe mi havis diversajn laborojn. Mi estis instruisto en la baza lernejo, voĉinstruisto (*talpedagogo*), "aŭdpedagogo" kaj konsilanto por enmigrintaj senlaboraj personoj kun aŭdproblemoj kaj dum kvar jaroj ankaŭ konsilanto por surdblinduloj. La trijara EU-projekto "Laboro por neaŭdantaj enmigrintoj" estis interesa defio. (Divenu kiu proponis la esperantan nomon "Laboro"!) Post 2000 mi estis instruisto pri la sveda por enmigrintoj (*sfi-lärare*).

Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?

Mi trejnias ludi ukulelon. Por esti certa ke mi finfine sukcesu ludi almenaŭ unu instrumenton mi aliĝis al du komencantularaj kursoj, lunde kaj marde. Merkrede mi gimnastikas kaj jaŭde mi partoprenas en angla konversacia studrondo. Kune kun mia edzo mi multe biciklas, prefere al nia somerdometo, kie la naturo jam reprenis la florbedojn kaj la iamajn legobedojn.

Ĉu vi havas familion?

Mia edzo Sven kaj miaj du filoj (40-kaj 36-jaraj). Bedaŭrinde ili ne interesiĝas pri Esperanto. En nian familion ni ankaŭ enkalkulas du baptinfanojn - Amanda (9-jara) kaj Erik (4-jara), ilian patrinnon Elena, surdan rumaninon, kaj ŝian edzon Per.

De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?

Mia patro lernis Esperanton krom multaj aliaj lingvoj, sed ĉiujn li parolis en smolanda dialekto. Li volis ke mi lernu Esperanton, sed daŭris longtempe ĝis mi finfine decidis serioze studi ĝin en Karlskoga en la aŭtuna studsezono 2000. Komence de la 90-a jardeko mi kaj mia edzo partoprenis kune kun Freinet-pedagogoj en kursoj en Francio kaj Ĉeĥio. Ni ankoraŭ havas kontakton kun tri paroj el tiuj kursoj.



Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?

Jes, mi estas la prezidanto de ILEI-se. Mi iris al jarkunveno kun multaj konsiloj de mia edzo: Ne akceptu labortaskojn! Hejmenirinte mi devis konfesi ke mi tamen akceptis taskon. Nun estas mia dua jaro kiel prezidanto. La estraro de ILEI-se estas tre ide-riĉa kaj vere inspiras min. Nia ĉefa celo estas pligrandigi la aron de E-instruistoj kaj prizorgi ke troviĝas bonaj lerniloj.

Mi partoprenas en esperanta Yahoo-grupo, IP, Indigenaj Popoloj. En 2005 mi studis indigenajn popolojn ĉe la gotenbarga universitato (Museion). Mi skribis eseon pri la koisan-popolo en la Kalaharo-dezerto. Sed ankaŭ por la svedaj sameoj devas esti interese partopreni en la grupo. Do, mi igis la studodirektoron de Museion kaj la prezidanton de la Vestrogotia Samea Sekcio partopreni en la debatgrupo.

Kiu estas via preferata libro en Esperanto?

La ŝtona urbo de Anna Löwenstein estas tre interesa libro pri angla virino forrabita al Romo kiel sklavo. Unue mi pruntis ĝin en la urba biblioteko, sed nun mi havas propran ekzempleron. Ankaŭ *Vualo de l' silento* de Ĝura mi legis sen pensi ke ĝi ne estas en la sveda. Temas pri juna nordafrika virino, kiun la familio mortkondamnis kiam ŝi enamiĝis al neislama viro. Sed mi nuntempe ofte legas nebeletran literaturon, ekz: *Manlibro pri Instruado de Esperanto* kaj *Ĉu nur-angla Eŭropo?*

Ĉu ekzistas aliaj interesaj pri vi.

Ne, mi ne volas plilongigi la intervjuon. Multaj interesaj artikoloj atendas lokon en *La Espero*.


Skribe intervjuis: Leif Nordenstorm

ANONCETOJ

Sepjara francino volas korespondanton en Esperanto. Informas: Lennart Jacobson, tlsweden@home.se, tel. 031 88 68 85

Seminario pri informado, instruado kaj utiligado de Esperanto

Sveda Esperanto-Instituto invitis al du-taga seminario en Karlskoga Popola Altlernejo la 7-an ĝis la 8-a de Oktobro 2006 La Temo - informado, instruado kaj utiligado de Esperanto - bedaŭrinde nur allogis entute 20 homojn.



Ni, la malgranda aŭskultantaro, ĝuis tre kompetentan kaj tre bonajn prelegojn kaj mi tre bedaŭras ke ne ĉiuj de ILEI-se ĉeestis.

Radojica Petroviĉ parolis pri aktualaj tendencoj en pedagogio, instru-kaj lerneteknologio kaj instrumentodiko de lingvoj kaj ni ĉiuj vigle interparolis. Poste li parolis pri sukcesfaktoroj en Esperanto-instruado. Li speciale parolis pri la modernigo de la internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA, ĉar SEI-jarkunveno decidis aliĝi al ILEI/UEA internacia ekzameno.

Håkan Lundberg informis pri Nitobe - lingva diverseco kaj demokratio. Politikaj aspektoj de lingvo kaj komunikado. Sonja Petroviĉ-Lundberg parolis pri la esperantista junulara unuiĝo kaj ĝia laboro por Esperanto. Ŝi informis ankaŭ pri la nova versio de lernu.net kaj ni ĉiuj eklernis kiel fariĝi tradukhelpantoj, kiuj estas tre

bezonataj. Estis kvizopromenado kiun gajnis Siv Burell.

La distra parto gvidis Martin Strid kaj ni eĉ aŭskultis Ole Hansen kanti en la dana lingvo.

SEI jarkunveno, okazis spite ke ne ĉiuj membroorganizoj havis siajn reprezentantojn ĉi tie - almenaŭ estis por: SEF - Kaisa Hansen och Ole Hansen, KELI - Birgitta Anevik, SEJU - neniŭ SLEA - Soile Lingman, ILEI-se - Siv Burell, och Ragnhild Berglund Eldona Societo Esperanto - neniŭ.

Elekto de estraro: ĉiuj estis reelektitaj: Lars Forsman- prezidanto; Ann-Louise Åkerlund - kasisto; Folke Wedlin - sekretario; Inga Johansson - estrarano; Birgitta Anevik - estrarano:

La plej grava estis la decido aliĝi al la internacia ekzameno de ILEI/UEA kaj al Europakomisiona sistemo pri lingvoscio.

Kaisa Hansen

Li esploras pri Esperanta literaturo

La originala esperantoliteraturo estas temo de projekto de Geoffrey Sutton de post kvin jaroj.

Li preparas enciklopedion pri la jaroj 1887- 2007, en la angla lingvo, kiu estas lia gepatra lingvo. La celo estas prezenti la originalan esperantoliteraturon al ekstera publiko en angleparolantaj landoj.

En kunveno de la Esperantoklubo de Stokholmo en septembro, li prezentis la laboron. Inicinto venas de li

mem, kaj li havas kontakton kun esperantistoj tra la mondo por kontroli faktojn aŭ ekhavi informojn. La verko prezentos la esperantan literaturhistorion en kvin periodoj, laŭ divido kiun jam uzis aliaj verkistoj pri literaturo de Esperanto. Por ĉiu el la periodoj estos enkonduko, kaj poste artikolo pri ĉiu el la verkistoj, kiuj eldonis sian unuan verkon dum la periodo.

Geoffrey Sutton estas sperta eldonisto kaj redaktoro de libroj, sed ne mem estas edukita literaturhistoriisto. Li uzas recenzojn en esperantaj revuoj kaj bibliotekoj por la materialo. La elekton de verkistoj li ĉerpas el artikoloj kaj recenzoj, kiuj prezentas la literaturajn verkojn.

Verkisto de eldonita verko, kiujn oni neniam menciis en recenzoj aŭ aliaj artikoloj, kutime ne estos menciita en la enciklopedio.

"Ekzemple la konata Eroŝenko estis koŝmaro", li diras. "Eroŝenko estis blinda esperantisto el Eŭropo, kiu vojaĝis en Japanio kaj norda Azio. Li verkis abunde en la japana, en Esperanto kaj en aliaj lingvoj, kaj oni tradukis liajn verkojn sen indiki la titolojn de la

originalo kaj sen indiki eldonjaron. En tiu kazo, kiel scii, kio estas originala literaturo kaj kio estas tradukoj?"

La enciklopedio estos dika volumo, kaj kompreneble estos iom da laboro trovi financigon por la eldono. Geoffrey Sutton mem opinias, ke ĝi estos verko por konsultado, ekzemple en bibliotekoj kaj ĉe esploristoj aŭ studentoj de literaturo. La superrigardaj enkondukoj al la kvin periodoj de la esperanta literaturo taŭgos, se iu volas fari tradukon al alia lingvo por prezenti la literaturon de esperanto, eventuale kune kun kelkaj elektitaj prezentoj de gravaj verkistoj.

Geoffrey Sutton loĝas en Britio, sed pasigis multajn jarojn en aliaj landoj. En la 1970-aj jaroj li estis en Svedio, kaj retenas kontaktojn kun svedaj esperantistoj. Li laboris per eldonado de esperantotekstoj en Ĉinio dum jaro komence de la 1980-aj jaroj, loĝis dum periodo en Japanio, redaktis revuon Esperanto en Nederlando dum tri jaroj, kaj post tio laboris ĉe britaj eldonejoj per gvidlibroj pri havenurboj kaj pri turismaj lokoj.

Ulla Luin

Geoffrey Sutton kune kun edzino Carmen dum promeno en la arbaro de Tyresö, septembro 2006. Fotis: Ulla Luin



Sukcesa esperantokurso ĉe Marston Hill

ANONCETO

Aperis filmo en Esperanto: Gerda Malaperis, bazita sur la samnoma libro de Claude Piron. La filmo daŭras 1 horon kaj 45 minutojn.

La DVD havas subtekstojn en 7 lingvoj (Esperante/ France/ Portugale/ Hispane/ Germane/ Nederlande kaj Angle). Informas: www.imagufilmo.org

Jen du raportoj pri la sama aranĝo.

Dank' al la publika tago de la Nitobese-seminario en Gotenburgo en junio mi - kiel reprezentanto de ILEI-se - ricevis kontakton kun Jens Allwood, lingvisto, kiu ofertis al ni uzi sian kursejon Marston Hill, Mullsjö. Pro Jens ankaŭ du aliaj lingvistoj partoprenis en sabata "provkurso" komence de julio. Entute mi havis kvin gelernantojn, inter ili ĉina virino. Mi ŝatis la lokon kiu situas en promendistanco de la stacidomo de Mullsjö, kaj Mullsjö sialvice situas proksime al Jönköping.

Dum la antaŭtagmezo mi uzis la bonegan "Introduktion till esperanto" de Bertil Nilsson, sed en Power-Point-prezentado. Pro teknika problemo la supersignaj literoj estis anstataŭataj de kvadratoj. Tial ni havis konkurson: pri kiu litero temas? La partoprenantoj akceptis tiun malfacilaĵon kaj divenis tre ruzlerte. Antaŭtagmeze ni uzis pli ordinaran lernilon.

La semajnfino 26 - 27 de aŭgusto okazis la unua esperanta kurso en la iama angla centro, sed espereble ne la lasta. Venis dudek du personoj plus

du 11-jaraj knaboj kiuj de tempo al tempo partoprenis. Jam vendrede ok personoj estis surloke kaj preparis por la aliaj. Ragnhild Björklund eĉ pli frue. Estis bone havi ŝin kiel "gastiganton" kiu sciis kiel funkcias ĉion. Aino Åberg kuiris kaj magie kreis bongustan manĝaĵon je malalta kosto. Jens mem prizorgis ke ĉiam brulis fajro en la ĉefkunstruado.

Siv Burell

Miksajo de komencantoj, esperantuloj, lingvistoj, kaj aĝaj kaj malpli aĝaj, havis agrablan semajnfino ĉe la kursejo Marston Hill proksime al Mullsjö. Marston Hill uziĝis kiel lingvokursejo ekde la komenco de la dudeka jarcento tiam Martin Allwood translokiĝis el Anglujo al Svedujo.

Hieraŭ Jens Allwood, kiu estas la nepo de Martin, kursejstras krom lia ĉefokupo kiel profesoro de lingvoscienco ĉe la universitato de Gotenburgo. La kursoj ĉe la kursejo temos ĉiuj pri vivo de bona kvalito. Jens klarigis al ni ke esperanto estas afero kiu povas doni bonan kvaliton al la vivo.

Laŭ la planoj de la kursestro Siv Burell, kiu gvidis la studadon, la stu-

dadmaniero estis ĥaosa, libera kaj intensa. Ni grupiĝis al grupoj de kvar ĝis ses studentoj, el kiuj kelkaj estis komencantoj kaj kelkaj pli, malpli spertaj. La diverseco de la partoprenantoj donis instruadeblecon al la spertuloj. La komencantoj rapide gajnis profundajn spertojn pri Esperanto. Fakte, post la unua tago ili povis prezenti sin mem, babili pri kutimaj aferoj kaj eĉ kompreni la signifan enhavon de malfacilaj rakontoj.

Dum la vespero Jens rakontis kaj montris bildojn pri la historio de la lingvokursejo. Rune Moln el Jonköping rakontis interese kaj montris bildojn pri Japanio. Ankaŭ multaj diversaj temoj de lingvoj, gramatiko kaj Esperanto pritraktiĝis per diskutoj dum la vespero. Al mi plaĉis la etoso de tiu ĉi semajnfino, la etoso kiu kreiĝis de la diversaj partoprenantoj, aranĝantoj kaj la interesiga ejo. Esperas kaj kredas ke pluj Wsperantorenkontiĝoj okazos tie.

Martin Wiss

Kultura nokto en Norrköping

La 26a de septembro estas internacia lingvotago. Sur la bildo sube vi povas vidi Ulla Luin kaj Kaisa Hansen kiu deĵoras en ekspozicio en la Kultura Domo en Stokholmo.

Ĉi-jare la kultura nokto en Norrköping, la 30-an de septembro, ankaŭ havis esperantistan programon. La fama duopo ŝomArt kaj Nataša kune kun sia filino Karina prezentis tre ŝatatan kant-kaj muzikprogramon kadre de la ĝenerala programo de la nokto. Ĉeestis 28 personoj. El tiuj duono estis neesperantistoj kiuj ricevis

ekzempleron de la informilo "Språket esperanto" kune kun malgranda lingva testo. Norrköpings Tidningar raportis pri la evento per notico kaj foto.

Haldo Vedin

Lingva festivalo en Västerås

Sabaton la 14-an de oktobro estis aranĝita duontaga lingva festivalo en la biblioteko de Västerås. Ĉefa motoro de la evento estis Wim Posthuma kiu kun helpo de plejparte eksterlanddevenaj esperantistoj el preskaŭ la tuta lando sukcesis bonege prezenti grandan nombron da lingvoj el multaj diversaj mondopartoj. Inter la "lingvaj ambasadoroj" estis Margarita Zelve, aktiva esperantisto el Riga, kiu reprezentis la latvan.

Dum la tago ankaŭ okazis diversaj distraĵoj. Tri malsamaĝaj grupoj el Bolivio prezentis muzik- kaj dancprogramojn kaj grupo da pensiuloj el Västerås dancis *square*-dancojn el Usono. La por ni bone konataj ŝomArt kaj Nataša kantis kaj ludis kaj kvaropo da junaj virinoj el Kazahio dancis.

La lingvisto Tuomo Grundström interese prelegis pri diferencoj inter finnugraj kaj nordgermanaj lingvoj.

Kiel konstatis la estro de ABF en Västerås dum la malfermo, tia lingva festivalo signifas multon por krei intereson pri aliaj lingvoj kaj kulturoj. Wim Posthuma havas grandan honoron el la bona aranĝo.

Haldo Vedin

Anonco en Studentliv

La Esperanto-movado ne estas tre riĉa movado. Ni tamen iam uzas monon por anonci. La suba anonco aperis en la revuo Studentliv.



Esperanto perdis sian plej grandan verkiston



William Auld

William Auld, la plej elstara Esperanto-verkisto, forpasis la 11-an de septembro. Li naskiĝis la 6-an de novembro 1924, eklernis Esperanton en 1937 kaj aktivigis en la Esperantomovado en 1947, kiam li ankaŭ komencis serioze verki en Esperanto. En la Jubilea Jaro 1987 William Auld estis elektita kiel Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio. Profesie li estis vicestro de liceo en la skota urbeto Dolaro.

Auld estis unu el la plej konataj kaj fekundaj kontribuantoj al la Esperanta kulturo, kiu aŭtoris, tradukis aŭ redaktis plurajn dekojn da libroj. Li estas unu el la plej ofte premiitaj partoprenintoj de la Belartaj Konkursoj de UEA. Lia ĉefverko estas la poeziazo "La infana raso" (1956), kiu estas ĝenerale konsiderata la pinta atingo de la Esperanta literaturo kaj kiu pro sia humanisma kaj porpaca mondriĝardo fariĝis kvazaŭ "nacia epopeo" esperantista. Aliaj poemaroj de Auld estas "Spiro de l'pasio" en la kolekto "Kvaropo" (1952), "Unufingraj melodioj" (1960), "Humoroj" (1969), "Rimleteroj" (kun Marjorie Boulton, 1976) kaj "El unu verda vivo" (1978). Liaj kolektitaj poemoj aperis en la volumo "En barko senpilota" (1987). Auld redaktis du eldonojn de "Esperanta antologio" (1958 kaj 1984), la panoraman antologion de Esperanto-tekstoj "Nova Esperanta krestomatio" (1991) kaj kelkajn aliajn antologiojn. Li verkis amason da eseoj, artikoloj kaj prelegoj por multaj gazetoj kaj Esperanto-aranĝoj, kaj ili aperis ankaŭ libroforme en "Facetoj de Esperanto" (1976), "Pri lingvo kaj aliaj artoj" (1978), "Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto" (1979), "Vereco, distro, stilo: Romanoj en Esperanto" (1981), "Kulturo kaj internacia lingvo" (1986) kaj "Pajleroj kaj stoploj" (1986). En 1988 aperis lia enkonduko al la Esperantaj lingvo kaj movado "La fenomeno Esperanto".

Abunda estas ankaŭ la rikolto de tradukoj fare de Auld. Inter ili elstaras "Kantoj, poemoj kaj satiroj" de R. Burns (1977), "Epifanio" (1977) kaj "La sonetoj" (1981) de Shakespeare, "Aniario" de H. Martinson (kun B. Nilsson, 1979), "La robaioj" de Omar Kajam (1980), "La graveco de la fideleco" de O. Wilde (1987) kaj la trivoluma "La mastro de l'ringoj" de J.R.R. Tolkien (1995-1997), kiun li

mem konsideris sia traduka ĉefverko, dum plej kara al li estis "Jurgen" de J. Branch Cabell (2001).

Auld redaktis plurajn revuojn, i.a. "Esperanto en Skotlando" (1949-1955), "Esperanto" (1955-1958, 1961-1962), "Monda Kulturo" (1962-1963), "Norda Prismo" (1968-1972), "La Brita Esperantisto" (1973-1999) kaj "Fonto" (1980-1987), kaj kunlaboris kun aliaj gazetoj. Li verkis senombrajn recenzojn kaj kelkajn lernolibrojn, i.a. "Esperanto: a new approach" (1965) kaj "Paŝoj al plena posedo" (1968). Auld estis vicprezidanto de UEA (1977-1980), membro de la Akademio de Esperanto (1964-1983) kaj ĝia prezidanto (1979-1983). En 1995 Auld ricevis la Premion Deguchi. Li estis ankaŭ honora prezidanto de Esperanta PEN-Centro. Ekde 1999 William Auld estis unufoje kandidatigita por la literatura Nobel-premio.

Laŭ gazetinformilo de UEA

TRA LA LANDO

Klubo en Hernusando

Esperanto ŝajnas havi longan historion en Hernusando, la iama "ĉefurbo" de Norrlando. Antaŭ 70 jaroj la hinda vojaĝisto Sinha rakontis pri esperantistoj en Hernusando kiuj montris al li la faman subĉielan muzeon de Murberget. Tamen ŝajnas ke ĉi tie ne ekzistis klubo, ĉar tiuj esperantistoj ne lasis spurojn en arkivo.

Do finfine, la 17-an de majo 2006, fondiĝis la unua loka klubo; Hernusando Esperantista Klubo, primtempe, samtempe kiel la esperantista movado en Svedio havis 100 jarojn.

Dank' al interreto kaj la kreskanta mallaŭdo inter junuloj kontraŭ la usona mondreĝimo, Esperanto taŭgas nun pli ol iam. Krom tradiciaj metodoj kiel studgrupoj en la internacia lingvo, HEK ankaŭ laboras por evolui metodojn kaj areojn pro organizi, uzi kaj disvastigi Esperanton, taŭgajn por nova tempo.

Robin Rönnlund
Prezidanto



Esperantkurso en Lesjöfors

Antaŭ la kurso, mi kompreneble ne sciis kio okazos kaj kiel multe mi lernos. Mi memstudis unu jaron antaŭe sed forgesis multe da vortoj. Tamen mi estis tre kontenta havi feriojn kaj forvojaĝi de Stokholmo. Studi esperanton en mia libertempo ŝajnis tre plaĉa!

Mi veturis per aŭtobuso de Stokholmo. Ni estis kvin esperantistoj en la sama aŭtobuso. La vojaĝo estis proksimume tri horoj, se mi memoras korekte.

Poste mi ricevis la ŝlosilon de mia ĉambro, mi trovis multajn homojn kiuj kantis kaj ludis diversajn instrumentojn. Ili estis grupo de kulturinterresataj junularoj kiuj faris muzikradioprojekton kaj loĝis en la esperantodomo dum unu semajno. Ili estis tre afablaj kaj ni ofte ludis kune. Kiam ni parolis ni uzis la anglan lingvon, ĉar ili ne parolis la internacian lingvon Esperanton kaj ili estis de diversaj landoj.

Ankaŭ en la kurso ni ofte kantis kaj ludis. Dum la tago ni havis lecionojn en malsamaj grupoj kaj post la tagmanĝo ni havis diversajn komunajn aktivecojn, ekzemple dancoj kaj ludoj, kelkfoje kune kun la kulturjunuloj.

Ni vidis multe da piedpilko en la televido, ĉar dum la semajno okazis la mondĉampionado de piedpilko. Ni ankaŭ faris ekskurson kun vizito en fama preĝejo kaj naĝo.

La kulturjunuloj havis sian propran kuiriston kaj ni, kiuj estis vegetaranoj, rajtis manĝi kune kun ili. Ĉiu manĝo estis tre bona. Kvar tre afablaj homoj de diversaj landoj, kiuj laboris en "la bieno en Nordio" dum kelkaj semajnoj, ankaŭ partoprenis en la kurso. La vetero estis malbona dum lundo ĝis merkredo, sed poste la suno brilis.

Komence de la kurso, mi ne komprenis multe. Sed post kelkaj tagoj ĉiuj vortoj, kiuj dum unu jaro dormis en mia cerbo, vekigis. La instruistoj estis tre bonaj kaj la kurskamaradoj estis tre afablaj. Dum nur kvar tagoj mi lernis pli ol mi lernis dum du monatoj kun memstudioj, ĉar mi parolis (provis paroli!) ĉiun tagon en la kurso. Mi tre rekomendas partopreni en la somerkurso kaj mi nun volas viziti internacian kunvenon kiel eble plej baldaŭ kaj ekzerci paroli Esperanton.

Jonas Redmo

Jul och/eller nyår på Esperanto-Gården

Välkomna!

Esperanto-Gården inbjuder alla esperantister i Norden till en träff – där du själv avgör din vistelselängd och i vilka aktiviteter, diskussions-, mat- och andra arbetsgrupper du har lust att hjälpa till – delta i.

Kostnad: du ger en gåva till EG och får en säng till ditt förfogande eftersom detta är "arbetsveckor" för att vi skall försöka utveckla samarbetet mellan organisationerna så att Esperanto-rörelserna blir synliga och går framåt i utvecklingen. Förtäring, några personer är villiga att ställa upp och hjälpa till i "köksregionen" – Bon'Apetito har stängt – därför tillämpas självkostnadspris.

Program... vad vi gör det till: ta med ett glatt humör – diskussions-

underlag och idéer samt våga vara lite lagom "tokig" så höjs stämningen som vi brukar säga i Värmland.

Du som tänker komma får gärna sända in idéer för diskussionsteman, utvecklingsidéer, om du vill att "deltagarna" skall få möjlighet att hemma förbereda "debatterna". Vi kan då sända över ditt material till dem som anmäler sig till träffen.

4-5 januari planeras ett studiebesök vid Hällefors Folkhögskola – den skola som lovat ställa upp för att arrangera en 15 veckors långkurs. Kursen kan startas när som helst på året med 2 månaders varsel. Långkursplanering ett ämne, liksom följande frågeställningar.

inte vara styrelsefolk?

Anmäl dig snarast till 2006/07 års nyårsveckor på Esperanto-Gården, Stiftelsevägen 1, 680 96 Lesjöfors. tel. 0590 - 30909, fax 0590-303 59 egarden@esperanto.se, www.esperanto.se/medlem/eogarden/

Post kristnaska kaj novjara festosemajnoj (n-oj 52 kaj 01) kun evolueblo pri E-o kaj ĉiuj esp-organizoj. Bonvenu alveni ek de la 22-a decembro 2006 ĝis kiam estos ĝusta por vi – foriru kiam vi bezonas! Esperanto-Gastejo invitas ĉiujn nordlandajn esperantistojn al kunveno.

Prenumerera!

Svenska Esperantoförbundet erbjuder sina medlemmar att prenumerera på esperantotidningar för 2007. Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på plusgiro 14 74 29 -5, SEF, specialkonto, samt att på talongen ange vilka tidningar, som avses. Vill du fråga något ytterligare kan du göra det hos: Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, 242 35 Hörby, tel 0415-50152.

Tidning	nr/år	pris kr
Brazila Esperantisto	4	120 *
Esperanta Finnlando	6	170
Esperanto	11	340
Esperanto Dokumentoj	10	260
Esperanto en Danio	5-6	125 *
Femina	4	205
Fonto ne aperos en 2007		
Heroldo	17	335
ICEM	4	170 *
Juna Amiko	3	130
(Rabatt från 3 exemplar)		105
Komencanto	6	170
Kontakto	6	200
La Jaro	1	49
La Kancerkliniko	5	210*
La Ondo	11	300
La Ondo rete		112
Literatura Foiro	6	310
Litova Stelo	6	130 *
Monato	11	430
Monato (retversio)		258
Norvega Esperantisto	6	105
Oomoto	2	100
ROK Gazet	1	155*
(155 kr gäller för tre nummer)		
Sciencia Revuo	4	190*
TEJO-tutmonde	4	105
Tidningar markerade med * har inte lämnat prisuppgift för 2007		

TRA LA MONDO

John Wells en malferma tago

Prof. John Wells, iama prezidanto de UEA, estos la ĉefa gasto en la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA, kies 25-a eldono okazos sabaton, la 25-an de novembro. La jusa profesia emeritiĝo de prof. Wells inspiris lin elekti kiel temon de sia prelego "Rigardi malantaŭen, rigardi antaŭen".

La Malferma Tago ricevos gaston ankaŭ el Japanio, la lando de la venontjara UK: Usui Hiroyuki alportos salutojn de la Jokohama LKK kaj parolos pri la kongresa temo "Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto". Krom prelegoj, en la programo estos ankaŭ i.a. prezentado de novaj Esperanto-filmoj kaj diskuto kun prezidanto Renato Corsetti kaj kelkaj aliaj estraranoj de UEA, kiuj kunsidos en Roterdamo en la sama semajnfino.

Kiel tradicie, la vizitantoj povos profiti de rabatoj en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos

Interlingvistika sesio en Poznan

20 gestudentoj el 10 landoj partoprenis la trian semestron de la Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) inter la 23-29-a de septembro. Prof. John Wells

gvidis kurson pri la bazoj de ĝenerala kaj esperanta fonetiko. Doc. Michel Duc Goninaz prezentis problemojn de esperanta sintakso. István Ertl traktis ĉapitrojn el la tria periodo de esperanta literaturo kaj analizis poemojn de William Auld. Michael Farris (instruisto en UAM) faris enkondukon al ĝeneralaj leksikologio kaj semantiko.

Malgorzata Nitkowska, pola studentino el la antaŭa grupo, sukcese defendis sian diplomlaboraĵon "Pro-pedeŭtika valoro de Esperanto por la lernado de la angla lingvo" sub la gvido de Maria Majerczak.

La sciencan programon akompanis agrabla varmaŭtuna renkontiĝo kun Poznanaj esperantistoj en la ĝardeno de unu el la partoprenantoj.

Kiel tradicie aŭtune, la universitata sesio kompletigis la riĉa arta programo de la 22a ARKONES kun signifa kontribuo de la prelegantoj kaj ankaŭ de gestudentoj (pri Schwartz, francaj kanzonoj, problemoj de tradukado, diskuto pri W. Auld, DVD "Esperanto elektronike", specifeco de ru-soj, esperanta slango, itala renesanca arto kaj lingvaj rajtoj).

La publikaj prelegoj pri lingvopolitiko en EU en la universitato, post la sesio por neesperantistoj, estis nova iniciato. Krom la prelegantoj de IS kontribuis Malgorzata Handzlik, eŭroparlamentano.

d-rino Ilona Koutny
akademiano

2006

22 decembro-7 januaro (proksimume) Novjaraj semajnoj en Esperanto-Domo, Stiftelsevägen 1, 680 96 Lesjöfors Tel. 0590 - 30909, fax 0590-303 59 (Vidu paĝo 6.)

egarden@esperanto.se

www.esperanto.se/medlem/eogarden/

27. decembro - 3. januaro **50-a Internacia Seminario** en Wewelsburg (Vevelsburgo), Germanio. Inf:

2007

7 - 19 januaro **22-a Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto**, Tasmanio. Inf: Marcel Leereveld, 12 Heather Grove, Belgrave South Victoria 3160, Telefono kaj faksimilo: +61(0)397545173. Rete: marcel@melburno.org.au

12 - 19. majo **59-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)** en Parizo. Inf: AFCE/UAICF 59-a IFEF-Kongreso, 9 rue du Château-Landon, FR-72010 Paris, Francio. Tel.: +33(0)1 48 53 05 52, rete: sylviane.lafargue@sncf.fr

17 - 20. majo **Sveda Esperanto-Kongreso** en Esperanto-Domo, Lesjöfors. Eble ne dum ĉiuj kvar tagoj, tamen dum la ĉielira semajnfino. Informoj venos en La Espero

14 - 22. julio **43-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-43)** en Siauliai. Inf: Litova E-Asocio, rete: litova.ea@mail.lt

21 - 26. julio **BEF-4 (Balta Esperanto-Forumo)** en Kaliningrado (Ruslando). Inf: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando, Tel.: +7-4012-656033 Rete: sezonoj@gazinter.net aŭ sezonoj@yandex.ru

21 - 28. julio **18-a Ekumena Esperanto-Kongreso 2007**, 60-a kongreso de IKUE, kaj 57-a kongreso de KELI en Pelplin, Pollando. Inf: Eichkorn, Bernhard aŭ Kozyra, Eduard, PL-83-130 Pelplin, Strzelnica 8 esperanto@powiat.malbork.pl aŭ Jadwiga Wasiuk

23- 27. julio **Esperanto-kursoj** (elementa kaj por progresantoj) en la Popola Instituto de Valamo, Heinävesi, Finnlando. Ebleco kunvojaĝi ŝipe al festivalo Arta Lumo. Inf: Esperanto-Asocio de Finnlando, sekretario Tiina Oittinen, Puutarhakatu 26 A 11, FI-20100 Turku, Finnlando tel. +358-2-2305319, eafsekretario@esperanto.fi

27. julio - 1. aŭgusto **Festivalo Arta Lumo**, Kuopio, Finnlando. Multflanka kultura aranĝo kun bonaj muzikistoj, verkistoj kaj aliaj artistoj en ĉarma ĉelaga urbo. Antaŭeekurso al la monaĥejo Valamo de kie ŝipvojaĝo al Kuopio. Inf.: Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando, ArtaLumo@esperanto.fi

28. julio - 3. aŭgusto **Internacia Junulara Kongreso** en Hanoi, Vjetnamo

1 - 8. aŭgusto **Internacia Junulara Semajno**, IJS en Hungario. Inf: Hungara Esperanto-Junularo, Pf. 87. HU-1675 Budapest, Hungario. ijs@ijs.hu

4 - 11. aŭgusto **92-a Universala Kongreso de Esperanto** en Jokohamo, Japanio. Inf: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel: +3110-4361044, fakso: +3110-4361751. Rete: uea@inter.nl.net

11 - 19. aŭgusto **40-a Konferenco de ILEI** en urbo Ranzan, Japanio. Inf: ILEI

www.eventoj.hu kaj aliaj fontoj

EU-aktuelte nu också på esperanto

Finlands regering informerar om EU-ordförandeperiodens händelser huvudsakligen på engelska och franska, men en gång i veckan även på latin. Nu finns denna veckoöversikt även på esperanto. Om detta meddelas i statsrådets officiella nyhetsbrev på adressen eu2006.fi.

Initiativet till att publicera EU-aktuelte på esperanto kom från engelsmannen Tim Morley, som kom på idén då han märkte att Finland under sin ordförandetid publicerar en nyhetsöversikt på latin.

- Det är fint att ordförandelandet använder latin. Det påminner oss om vår gemensamma europeiska historia och vårt kulturarv. Men då man vänder blicken mot nutiden och framtiden kan man konstatera att betydligt fler européer talar esperanto än latin, säger Morley.

Med hjälp av en sverigefinländare hade engelsmannen, som tog initiativet, på finska anhållit om lov av Statsrådets kansli att publicera esperantoversionen.

- Det här är ett typiskt exempel på det gränslösa internationella samarbete som förekommer i esperantokretsar, framhåller Anna Ritamäki ordförande för Esperantoförbundet i Finland.

Esperantoförbundets ordförande beklagar samtidigt att de inhemska språken blivit satta på undantag i informationen från ordförandelandet.

Kongresis kristanoj

Ekde la 12-a ĝis la 19-a de aŭgusto KELI-anoj kongresisen Ĉeĥio, en la vilaĝo Stráz'né, kiu situas en la Giganta Montaro je la limo inter Ĉeĥio kaj Pollando. La kongresejo nomiĝas Horský Domov, kaj ĝi apartenas al lac'eh'a evangelia eklezio: Ĉeĥa Fratara. Ĝi konsistas el kvar konstruaĵoj kun manĝosalono, loĝejoj kaj preĝejo. "Naturo kaj progreso, kion toleri?" estis la kongresa temo, kiun ni pritraktis en diversaj prelegoj kaj diskutoj. La demandoj estis multaj, sed la respondoj malmultaj.

Sabate la 12-an de aŭgusto la kongreso komencis per interkona vespero kun ĝenerala prezentado, informado kaj vesperpreĝo. Montriĝis ke ni estis entute proksimume 40 personoj

el 10 landoj. Kvin gepartoprenantoj venis el Svedio.

Dimanĉe post la matenmanĝo ni havis ekumenan diservon. Poste okazis la oficiala inaŭguro de la kongreso.

Vespere ni povis aŭskulti belan koncerton de ĉeĥa muzikisto, kiu prezentis diversajn blov- kaj kordinstrumentojn de la meza epoko kaj de la ĉeĥa popola instrumentaro.

Ĉiutage, lunde ĝis vendrede, ni komencis per matenpreĝo kaj finis per vesperpreĝo. Dumtage okazis kantado kaj diversaj prelegoj. Venontjare okazos ekumena kongreso en Pollando.

Mats Landfors

TRA LA LANDO

Skolforum 2006

Lars Forsman, Siv Sjögren, Anne-Marie Milianowicz och Kaisa Hansen agnade några dagar åt information till lärare på Skolforum 30 oktober till 1 november. Det totala antalet besökare var 17 152 st. (2005 var det 18 846 st.) Redan efter den första dagen hade vi känslan av succé! Vi hade ordnat vår bod till en lektionssal och Lars gav en esperantolektion varje timme. Det fanns sex stolar och det var fullsatt nästan hela tiden. Ofta stod de folk också i gången utanför och lyssnade på Lars. Vi hade också besök av SEF-medlemmar som är lärare de var också nöjda med arrangemanget.

En besökare från Kiruna berättade att det finns en fond som ger stipendium till esperantostudier men de har ingen lärare så han fick kontakt med Lars Forsman. Tre besökare klarade vår tävling och vann varsin ordbok.

Siv, Anne-Marie och Kaisa delade ut informationsmaterial - alla "Språket Esperanto" tog slut sen delade vi ut Roland Lindbloms brevkurs - den tog också slut!

Vi tyckte att tonen hade ändrats bland besökarna vi behövde inte någongång "försvara" esperanto och det var nu bara ett fåtal som sa "lever esperanto fortfarande". Och de blev övertygade när vi visade den nya läroboken för gymnasiet och att det nu var 15 bibliotek i Sverige som beställt dessa.

Vi visade också bildspelet som ILEI-se har utarbetat och vi delade ut den DVD som E@I har gjort. Vi kände helt enkelt att vår bod var välbesökt! Jag vill särskilt tacka alla som med penninggåvor och arbetstid har gjort detta möjligt. Varmt tack!

Kaisa Hansen

Bliv medlem i UEA 2007

UEA är den största organisationen i världen för esperantister.

Den behöver ditt stöd för att allt bättre uppfylla sina viktiga uppgifter att

- * sprida esperanto
- * verka för en lösning på språkproblemet i internationella sammanhang
- * underlätta all sorts kommunikation mellan människor oavsett ras, religion eller politisk åsikt
- * därmed öka förståelsen mellan folk och länder

UEA ger ut flera esperantotidningar bl.a. Revuo Esperanto, har en omfattande bokförsäljning och anordnar varje år en stor internationell världskongress för att nämna några verksamhetsområden.

För din egen del betyder det, att du får UEA:s årsbok med namn och adresser på delegater i hundratalet länder, och, om du är MA-medlem, får du tidningen Esperanto, som ger dig värdefull information om vad, som händer i esperantovärlden. Dessutom ger medlemskapet dig rätt till betydligt lägre kongressavgift.

Du betalar avgiften genom att sätta in pengarna på postgiro 14 74 29-5, SEF specialkonto. Ange på talongen vad pengarna avser.

Frågor besvaras av: Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, 242 35 Hörby tel. 0415-50152.

Avgifterna för år 2006 är följande:

MA Direktmedlem med årsbok och tidningen Esperanto. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får tidningen Kontakto.	530 kr
MJ Direktmedlem med årsbok. I övrigt se ovan!	210 kr
MG Direktmedlem med "Gvidlibro". Ger inte nersatt kongressavgift.	80 kr
SZ Avgift för "Societo Zamenhof", särskild stödorganisation. Ger inte medlemskap i UEA.	1 060 kr
PT "Patrono de TEJO", får tidningen Kontakto	630 kr
DM Dumviva membro" betalar för hela livet. Får årsboken och tidningen Esperanto	13 250 kr
DMJ "Dumviva membro kun jarlibro" betalar för hela livet. Får årsboken	5 250 kr
Dpat "Dumviva Patrono", betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken och blir därtill ständig medlem i "Societo Zamenhof".	132 500 kr
DPT "Dumviva Patrono de TEJO" betalar för hela livet och får tidningen Kontakto.	15 750 kr

Världsesperantokongressen (Universala kongreso) i Yokohama 4-11 augusti 2007

Anmälningsavgifter (svenska kronor)

	-31/12 -05	-31/3 -06	efter 1/4 -06
1. Direkt medlem i UEA(ej MG)	1500	1880	2255
2. Icke direkt medlem i UEA	1880	2350	2820
3. Medföljande, handikappad eller ungdom(född mellan 77-01-01 och 86-12-31), som är medlem i UEA	750	940	1130
4. Medföljande, handikappad eller ungdom, som inte är medlem i UEA	1130	1410	1690

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 86-12-31 betalar ingen kongressavgift.


Anmälningsblankett för kongressen kan beställas hos:

Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, 242 35 Hörby, tel. 0415-50152
Avgifterna kan komma att justeras uppåt, om kronan försvagas.

LIBROJ

Klasika dramo

Vintra fabelo, La. William Shakespeare. Tradukis H. Tonkin. UEA. Rotterdam. 2006. 154 paĝoj.



Mi tuj konfesu ke mi ne estas spertulo pri dramo. Eble ĝuste pro tio la enkonduko de la libro estis por mi vere grava. La tradukinto lerte rezumas la enhavon, komparas la dramon kun aliaj dramoj de Shakespeare kaj donas informon ege interesan por la leganto: Shakespeare same kial aliaj tiutempaj verkistoj verkis ne ĉefe por "esprimi sin" sed por plenumi la bezonojn de teatraj trupoj, kiuj ofte bezonis novajn dramojn por finance elteni. Interesege informo!

La verko temas pri la reĝo Leonto de Sicilio kaj la vizitanta reĝo Polikso de Bohemi. La unue menciita timas ke lia edzino gravediĝis kun la due menciita. Li enkarcerigas la reĝinon kaj forsendas la bebon al dezerta loko. Tamen dekse jarojn poste okazas io, kion vi ekscios se vi legos la libron.

La tradukon mi ne kompetentas kompari kun la originalo. Mi tamen povas honeste diri ke mi trovis nenian kialon kritiki ĝin.

Do, se vi interesiĝas aparte pri Shakespeare au pli ĝenerale pri dramo, legu ĝin.

Leif Nordenstorm